

Johann Wolfgang von Goethe,  
Из Гёте

*tradukita de Михаил Лермонтов*

Горные вершины  
Спят во тьме ночной;  
Тихие долины -  
Полны свежей мглой;  
Не пылит дорога,  
Не дрожат листы ...  
Подожди немного,  
Отдохнешь и ты.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Egalaĵo (Noktokanto de  
migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas  
Kviet',  
Kaj ne moviĝas  
Pro ventet'  
Iu foli';  
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.  
Atendu – baldaŭe  
Ripozos vi.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingo  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj  
Trankvil',  
Kaj ĉiuj fontoj  
Sen babil';  
Aŭdas vi ne  
Birdetan ĉirpon arbare.  
Pensu prepare  
Pri la pere'!

...

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27).

Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>.

Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>.

Pri la poeto Lermontov vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/МiДжaил\\_Lermontov](http://eo.wikipedia.org/wiki/МiДжaил_Lermontov).

La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “*Vestfaliaj Flugfolioj*”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).